PUBLIKIGO DE SCIENCAJ ARTIKOLOJ EN ESPERANTO

De OLAV REIERSØL (Norvegujo).

Du faktoroj estas necesaj por publikigo de sciencaj artikoloj en Esperanto, unue sciencistoj kiuj volas publikigi en Esperanto, due sciencaj revuoj kiuj volas akcepti esperantlingvajn artikolojn.

Ni konsideros la situacion el la vidpunkto de la sciencisto. La malavantaĝa flanko de publikigado en Esperanto estas evidenta. Sciencaj artikoloj en Esperanto estas legataj de malpli da homoj ol sciencaj artikoloj ekzemple en la angla aŭ franca lingvoj. Sed mi volas prezenti kelkajn faktojn kiuj montras ke la malavantaĝoj ofte ne estas tiel gravaj kiel oni povus supozi. La situacio estas iom malsama en diversaj sciencoj. Precipe en la matematikaj sciencoj legi esperantlingvan artikolon estas facile por neesperantisto kiu scipovas la anglan lingvon aŭ unu el la latinidaj lingvoj. Por ilustri tion mi volas rakonti pri esperantlingva artikolo kiun mi publikigis en „Portugaliae Mathematica". Usona profesoro, al kiu mi sendis represaĵon de la artikolo, poste skribis al mi: „Dankon pro la represaĵo de via artikolo. Mi neniam antaŭe havis la okazon legi ion en la portugala lingvo, kaj je mia surprizo mi trovis tion tre facila".

Ankaŭ en multaj ne-matematikaj sciencoj oni povas supozi ke esperantlingva scienca artikolo, se ĝi enhavas ion novan kaj gravan, estos legata de neesperantistoj. Sed por ke neesperantisto sciu ke la artikolo enhavas ion novan kaj gravan, li devas ricevi informon pri ĝia esenca enhavo en nacia lingvo. Tian informon li povas ricevi per resumo en unu el la plej gravaj naciaj lingvoj aldonita al la esperantlingva artikolo, aŭ per nacilingva recenzo en unu el la diversaj sciencaj recenzorevuoj. Tiaj recenzoj de esperantlingvaj artikoloj ja efektive aperas en la plej gravaj recenzorevuoj (kiel ekzemple „Mathematical Reviews" por la matematiko).

La verkinto havas ankaŭ la eblecon konatigi esperantlingvan artikolon per posta verkado de nacilingva artikolo kiu daŭrigas la temon de esperantlingva artikolo kaj referencas al ĝi.

Se malgraŭ tio esperantlingva artikolo estas malmulte legata aŭ se daŭras longan tempon antaŭ ol la sciencistoj atentas ĝin, tio ne ĉiam estas malavantaĝo por la sciencisto. Povas esti ke li komencis sciencan esploradon kiu indikis fekundan kampon por plua esplorado, kampon kiun li prefere konservos por si mem kaj eventualaj kunlaborantoj dum kelka tempo, samtempe kiel li deziras esti la unua kiu publikigas la rezultojn kiujn li jam trovis.

En Japanujo dum la lastaj jaroj pli ol 20 sciencistoj publikigis originalajn sciencajn artikolojn en Esperanto. Se oni enkalkulas ankaŭ tiujn kiuj publikigis resumojn en Esperanto, la nombro estas pli ol 50.[1])

[1]) La informojn pri Japanujo mi ricevis de profesoro Egami dum la Universala Kongreso en Oslo.

Ekster Japanujo nur malmultaj sciencistoj ĝis nun publikigis originalajn sciencajn artikolojn en Esperanto. Estus dezirinde fari enketon inter la sciencistoj por trovi ĉu tio estas kaŭzata de manko de deziro por esperantlingva publikigado aŭ de manko de sciencaj revuoj pri kiuj oni scias ke ili akceptos esperantlingvajn artikolojn. En tia enketo oni povus ekzemple demandi:

„Ĉu vi deziras publikigi originalajn sciencajn artikolojn en Esperanto.

(a) sen iu kondiĉo pri la revuo kie via artikolo povos aperi?

(b) nur sub certaj kondiĉoj pri la kvalitoj kaj cirkonstancoj (ekzemple konateco kaj ebleco por rapida publikigo) de la revuo en kiu via artikolo aperos?"

En japanaj sciencaj revuoj aperis ankaŭ artikoloj de alilandanoj. Sed kelkaj el la japanaj revuoj akceptas artikolojn nur de membroj de certaj organizoj aŭ institucioj, kaj mi ne scias kiom el la aliaj volus akcepti artikolojn de alilandanoj.

Kiam sciencisto volas publikigi en Esperanto, li povas mem turni sin al redakcioj de diversaj sciencaj revuoj en lia fako kaj al pli ĝeneralaj revuoj. Sed se estas pluraj sciencistoj en la sama fako kiuj deziras publikigi en Esperanto, estas neracie ke ĉiu el ili faras tiun esploron. Estas preferinde fari ĝin kolektive, per enketo en internacia skalo ĉe la redakcioj. Tia enketo verŝajne ankaŭ havas pli grandan ŝancon konduki al pozitiva respondo ol esploro farata de unuopulo.

655.51.001.4

REVIZIO DE MANUSKRIPTOJ SCIENCAJ KAJ TEKNIKAJ.

En la artikolo „Faka literaturo en Esperanto", la redaktoro de SCIENCA REVUO (vidu no. 12) kritikas la lingvan nivelon ofte nekontentigan de multaj sciencaj/teknikaj artikoloj kaj resumoj. Prave li sugestas ke „oni donu siajn manuskriptojn al aliaj, lingvospertaj kaj, se eble, ankaŭ fakspertaj samideanoj, por kritiko".

Por ebligi la praktikan efektivigon de ĉi tiu sugesto, ĉiuj E-lingvospertaj fakuloj sin konigu, por ke malpli spertaj verkistoj povu celserve kontakti ilin.

S-ano Jossinet el Parizo montras la vojon: Li funkcias kiel fakdelegito por „Revizio de manuskriptoj" (vidu en UEA-jarlibro 1952, paĝoj 157 kaj 240). Aliaj kapablaj samideanoj faru same.

Tuja rezultato povus esti atingata se „Scienca Revuo" publikigus adresaron de ĉiuj legantoj kiuj akcepte respondos al ĉi tiu alvoko. Oni ne forgesu indiki sian fakon.

A. Lienhardt, UEA-delegito en Mulhouse (Francujo).
Fako: Maŝin-tekniko, speciale Fervojoj.